# N I A V O Ĉ O
## Madrida Esperanto-Liceo
San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **JULIO-AŬGUSTO 2007**


**66-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO- 2007**

Ĝi okazis en Palos de la Frontera (Huelva) de la 5-a ĝis 8-a Julio kune kun la Kongreso de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

La OKK prezentis allogan programon, el kiu ni mencias:

Ekspozicioj: libroj kaj aliaj objektoj. Ceramikekspozicio. Francisca Alfonso kaj Chata Terrades

Prezentado de filmoj "Sevilla-maravilla", "Valencio en fajro", "Chopin revenas al Majorko", "Muroj kaj miljardoj", "Bona Espero", filmitaj kaj komentitaj de Roman Dobrzyński (Aŭtoro de la libro "La Zamenhofstrato", kun interparoloj kun d-ro L.C. Zaleski-Zamenhof).

Seminarioj: "Transitiveco je la verboj en esperanto". Djorge Obradoviĉ. (sloveno, inĝeniero). . "Uzado de "si" kaj "sia" en esperanto" . Francisko Simonet (el Parizo, Akademiano, estrarano de Libero por la Lingvoj). "Kunmetitaj verboformoj en esperanto". Zlatko Tišljar. (kroato, nun loĝanta en Slovenio, Komitatano de UEA dum dudek jaroj). "La uzado de prepozicioj". Augusto Casquero. (Prezidanto de HEF).

Prelegoj: "Liberon por la lingvoj" kaj "Unuaj momentoj de la historio de la Lingvo Internacia"(Francisko Simonet). La virinoj en la esperantistaro (Grazina Opulskine) [Grazina Opulskine, el Litovio, instruistino laŭ la Cseh-metodo gvidis kurson por komencantoj dum la kongrestagoj]. "Esperanto, kiel identeca lingvo de EU, defendas malgrandajn lingvojn en la Unio" (Zlatko Tišljar). La serĉado de natura metodo por la instruado de Esperanto (Miguel Gutiérrez Adúriz, kantabra verkisto kaj eldonisto en esperanto, membro de la Ibera Skolo). Linukso kaj Esperanto; kiel enmeti artikolon ĉe Vikipedio. (José Carlos Cuevas). "La esperanta muziko". (Eduardo Vargas, malaga muzikisto). "La vivo en Ĉinio" (Augusto Casquero). "Malsamaj starpunktoj ĉe la nuna esperanta mondo" (Fabián).

Amuzaĵoj: Loka artludado. Koncerto de Solotronik. Kultura vizito ĉe lokaj monumentoj. La Rábida kaj kolumbaj lokoj. Koncerto de Jomart kaj Nataŝa (kazaĵoj, loĝantaj en Stokholmo, Svedio) kaj loka Flamenka Grupo. Iluziista ludado.

Prezentado de libroj: traduko de "Platero kaj mi". Vortaro "AmikA" de Miguel Gutiérrez Adúriz.

Kunsidoj de HEF, AEU kaj JUSE.

Kursoj: Kurso por komencantoj (instruis laŭ la Cseh-metodo: Gražina Opulskienē). Oni trasdonis staĝdiplomojn al la gelernantoj kiuj sukcesis la staĝekzamenon.

Omaĝo al samideano Alfonso Escamilla Roa. Prezento de la omaĝa libro.

Nia Voĉo kore gratulas la organizantojn de ambaŭ sukcesaj Kongresoj, hispana kaj andaluzia.
Detala raporto aperos en venonta numero de Boletín de HEF.

**AMPLEKSA KOLEKTO DE "BOLETIN", NUN EN LA RETPAĜARO DE HISPANA E-FEDERACIO**

La HEF-portalo **http://www.esperanto.es** inaŭguris novan sekcion longe atenditan: **"BOLETIN".**
Ĝi enhavas ampleksegan kolekton de "Boletín"-oj de Hispana Esperanto-Federacio ekde la numero 1, de la jaro 1949, ĝis la laste aperinta en la nuna jaro, numero 378. Mankas pluraj ekzempleroj, dezirinde kompletigotaj per pruntedono por skanado far esperantistoj posedantaj ilin. La malnovaj numeroj devenas el la kolekto de la Gazetoteko Lanti. La kolekto atingeblas per la ligilo "Boletín" en la adreso: http://www.esperanto.es

**SKANITAJ LA CENT UNUAJ LIBROJ DE ESPERANTO**

Inter ili la unua Gramatiko de Esperanto, de Zamenhof. Jen la paĝo de Internacia E-Muzeo en Vieno:
http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/fruehdrucke.htm

**E-KURIOZAĴOJ**

La usona filmo "Gattaca", kiu uzas Esperanton por anoncoj disaŭdigitaj per laŭtparoliloj en salonego kie okazas parto de la filmo, estis vendita ene de la film-kolekto de la ĵurnalo El País.

Rodolfo Canet informis pri la renovigo de la hispana portalo Mailxmail, pioniro pri ĉiaspeca instruado senpaga per Interreto. Ĝi proponas, de antaŭlonga tempo, kurson de Esperanto. Ĝi estis pretigita far Hispana Esperanto-Federacio. La ĉefpaĝo de Mailxmail estas http://www.mailxmail.com kaj pri la senpaga esperanta kurso estas jena: http://www.mailxmail.com/curso/idiomas/esperanto

**HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO**

La Sekretariejo de HEF estos fermita ĝis la 17an de septembro. Vi povas telefoni al 91 446 80 79 (aŭtomata respondilo) aŭ kontakti rete: admin@esperanto.es

**AUGUSTO CASQUERO EN ĈINIO**

En la urbo Fuzhou (provinco de Fujian) oni inaŭguris memor-tabulon (ĉine kaj hispane) rilate la kunlaboron inter la futbola klubo CD Tortosa (Hispanio) kaj sia homonimo en Fuzhou. Augusto Casquero partoprenis kiel Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio kaj S-ro Hu Xu, esperantisto, kiel promotoro de la gemeliĝo de ambaŭ futbalaj samnomaj teamoj. La tolafiŝo ĉe la podio estis en la ĉina kaj en esperanto: "LA INAŬGURO POR LA FUNKCIO DE LA FUTBAL-BAZO DE CD TORTOSA (HISPANIO) EN FUJIAN, ĈINIO"

**FRANCISCO AZORÍN "Delokitaj arkitekturoj"**

Ĝis la fino de julio estas vizitebla en Madrido, organizita de la Ministerio pri Loĝado, ekspozicio pri diversaj hispanaj arĥitektoj, kiuj devis forlasi Hispanion post la fino de la interna milito. La nomo de la evento estas "Arquitecturas desplazadas".

Inter la pritraktitaj profesiuloj troviĝas la esperantisto Francisco Azorín Izquierdo. Inter la ekspoziciaĵoj troviĝas pluraj aludoj al lia esperantista aktivado, kiel organizanto kaj kiel verkisto de du vortaroj, unu ĝenerala kaj alia pri arĥitekturo (detaloj pri lia faceto kiel verkisto estas legeblaj hispanlingve en la retejo de José María Rodríguez Hernández, el kie verŝajne estis prenitaj diversaj informoj aperantaj en la ekspozicio)

http://es.geocities.com/azorin_esperanto/index.html

La ekspozicio montras kelkajn interesajn esperantaĵojn kiel la "Ilustrita vortaro de Esperanto" verkita de Azorín. Ŝajne, la "animo" de la organizado de la ekspozicio estis lia filo Manuel.

**VENONTAJ KONGRESOJ**

UK 2007 Yohohama (Japanio), 4 ĝis 11 aŭgusto.
7-a Eŭropa Esperanto Kongreso. Maribor (Slovenio) 28-a julio ĝis 4-a aŭgusto
15ª Internacia Esperanto-semajno de la Kulturo kaj Turismo. Tossa de Mar (Girono) 29-a septembro ĝis 6-a oktobro.
6-a Someraj Dialogoj. Monistrol de Montserrat (Barcelona) 8-a ĝis 9-a septembro.

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Post la feria periodo, la konversacia-rondoj kiun organizas Madrida Esperanto-Liceo rekomencos la 17-an de septembro, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3-7
Tel. 91 446 80 79.

# FELIĈAN SOMERON AL ĈIUJ !

---

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6- 4ºB EXT
28005 Madrid